

### Veranstaltungshinweise

Unsere **Esperantokurse** für: a) Anfänger mit Vorkenntnissen: Do. 19:30-21:00 Uhr, Gaststätte *Friesenheim*, Friesenstr. 15, 26935 Rodenkirchen; b) Fortgeschrittene: Do. 19:45-21:15 Uhr, Evangelisch-lutherische Kirchengemeinde Brake, Kirchenstr. 24, 26919 Brake. – Unsere **monatlichen Vereinstreffen** sind vorgesehen für den **17.01.2007**, 19:30 Uhr in der Gaststätte *Panorama*, An der Kaje 1B, 26931 Elsfleth; den **22.02.2007**, 20:00 Uhr (**Jahreshauptversammlung**) in der Gaststätte *Landhaus*, Am Stadion 4, 26919 Brake und den **17.03.2007** in Rodenkirchen mit **Besenwerfen und Grünkohlessen**. Aktuelles und Einzelheiten können unserer Netzseite <http://www.esperanto.de/unterweser/aranghoj.htm> entnommen oder bei Anne Höpken, Tel.: 04731-4837, erfragt werden. Gäste sind willkommen. Außerdem:

16.-18.02.2007 (vorläufig) Esperanto-Sprachkurse (drei Niveaus), ICH<sup>1)</sup>  
 19.-22.02.2007 (vorläufig) Esperanto-Sprachkurse (drei Niveaus), ICH<sup>1)</sup>  
 16.-20.05.2007 BARO (Berlina Arbara Renkontiĝo), Bad Münde  
 17.-20.05.2007 (vorläufig) Esperanto-Sprachkurse (drei Niveaus), ICH<sup>1)</sup>  
 21.-25.05.2007 (vorläufig) Esperanto-Sprachkurse (drei Niveaus), ICH<sup>1)</sup>  
 25.-28.05.2007 84. Deutscher Esperanto-Kongress, Hamburg  
 28.07.-04.08.2007 7. Kongress d. Europ. Esperanto-Union, Maribor, Slowenien  
 04.-11.08.2007 92. Esperanto-Weltkongress, Yokohama, Japan  
 13.10.2007 EMAS<sup>2)</sup>-Kulturtag, Oldenburg  
 19.-21.10.2007 100-jähriges Jubiläum der Esperanto-Vereinigung  
 Münster, Nordwalde (int. Wochenende mit Esperanto Nederland)

<sup>1)</sup>ICH: Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg, Tel.: 05521-5983

<sup>2)</sup>EMAS: Esperanto-Ligo de Malsupra Saksio (Landesverband Niedersachsen im Deutschen Esperanto-Bund e. V.)

### Impressum:

**Zeitschrift:**

**Erscheinungsweise:**

**Herausgeber:**

**Information und Redaktion:**

**Bankverbindung**

**(für Beiträge und Spenden):**

Esperanto Gazeto (ISSN 1861-3330)  
 dreimal jährlich als Druckausgabe und  
 elektronische Ausgabe, Netzseite:  
<http://www.esperanto.de/unterweser/gazeto.htm>  
 Esperanto-Gruppe Unterweser e. V.  
 (<http://www.esperanto.de/unterweser>)  
 Anne Höpken, Magdalenenstr. 27,  
 26954 Nordenham, Tel.: 04731-4837  
 Dörte Bierkämper, Tel.: 04404-3368  
 Andreas Kück, Tel.: 04702-5044  
 Mario Müller, Tel.: 04732-1373

Raiffeisenbank Oldenburg eG  
 BLZ 28060228  
 Kontonummer 1200160000  
 (Kassenwartin: Dörte Bierkämper)

**EGU - Esperanto - Gruppe Unterweser e. V.**

# Esperanto Gazeto

N-ro 18

ISSN 1861-3330

Feb. – Mai 2007

EGU-Info: <http://www.esperanto.de/unterweser>



Rodenkirchen, 23.09.2006, Marktumzug: blauer Himmel, grüner Deich und Esperanto. Wir verteilten Getränke, Bonbons, Esperanto-Broschüren und viel gute Laune unter dem Motto: „Besenwerfen im Sommer??? Wir kennen keine Grenzen!“  
 Rodenkirchen, 23-a de Septembro 2006, foirprocesio: blua ĉielo, verda digo kaj Esperanto. Ni disdonis trinkaĵojn, bombonojn, Esperanto-broŝurojn kaj multe da bona humoro je la devizo: "Ĉu balail-ĵetado somere??? Ni ne konas limojn!"

### La 3-a Rata Rendevuo (Bad Pyrmont, 8-a de Oktobro 2006)

Ĉirkaŭ 20 esperantistoj, el ili Alke, Anne, Kerstin, Jessica, Mario kaj Andreas de nia klubo, sekvis la inviton de la Esperanto-Grupo de Hameln je ekskurso al Bad Pyrmont. Tiu ĉi konata kuraĉloko abundas pri fontoj de sanigaj akvo kaj gaso. Ĉu vere sanigaj? Kompreneble nur en la ĝustaj dozado kaj aplikado. Pri ĉi tio klarigis nin la gvidisto en la *Dunsthöhle* ("haladz-kaverno"), natura fonto de karbondioksido: En unu el siaj interesaj eksperimentoj li petis Mario kaj Andreas unufoje profunde enspiri tiun gason. La efiko: duonsveno kvazaŭ post la trinkado de tro da ŝaŭmvino. (Enspiru tro longe nur karbondioksidon estas eĉ mortige!) Nu, pli bongustaj ja estis la akvo de ekz. la *Friedrichsquelle* ("fonto de Friedrich") kaj la tagmanĝo en itala restoracio post la multinforma gvidado en suna vetero tra la kuracparko kaj kastelo Pyrmont kun ĝia palmĝardeno. La 3-a Rata Rendevuo finiĝis per lumbildprelego de Reinhard Burgmann pri Florenco kaj la tie en 2006 okazinta Universala Kongreso de Esperanto. Multan dankon al li, Heinz-Wilhelm Sprick, Thomas Heberlein kaj la aliaj, kiuj ĝojigis nin per ĉi tiu bela tago. – Andreas

### Das dritte Rata Rendevuo („Ratten-Treffen“) (Bad Pyrmont, 08.10.2006)

Etwa 20 Esperantisten, unter ihnen Alke, Anne, Kerstin, Jessica, Mario und



Schloss Pyrmont / Kastelo Pyrmont

Andreas von unserem Verein, folgten der Einladung der Esperanto-Gruppe Hameln zu einem Ausflug nach Bad Pyrmont. Dieser bekannte Kurort ist reich an Quellen heilsamen Wassers und Gases. Wirklich heilsam? Selbstverständlich nur in richtiger Dosierung und Anwendung. Darüber klärte uns der Führer in der Dunsthöhle auf, einer natürlichen Kohlendioxidquelle: In einem seiner interessanten Experimente bat er Mario und Andreas, jenes Gas einmal tief einzusatmen. Die Wirkung: Benommenheit fast wie nach dem Trinken von zu vielem Sekt. (Zu lange ausschließlich Kohlendioxid einzusatmen ist sogar tödlich!) Schmachhafter waren da schon das Wasser aus beispielsweise der Friedrichsquelle und das Mittagessen in einem italienischen Restaurant nach der aufschlussreichen Führung durch den Kurpark und das Schloss Pyrmont mit seinem Palmengarten bei sonnigem Wetter. Das dritte *Rata Rendevuo* endete mit einem Diavortrag von Reinhard Burgmann über Florenz und den Esperanto-Weltkongress, der 2006 dort stattfand. Vielen Dank an ihn, Heinz-Wilhelm Sprick, Thomas Heberlein und die anderen, die uns mit diesem schönen Tag eine Freude bereiteten. – Andreas

## Enigma

|    |   |   |    |    |    |    |
|----|---|---|----|----|----|----|
|    | 1 | 2 | 3  | 14 | 15 | 16 |
| 1  |   |   |    |    |    |    |
| 2  |   |   |    | 4  |    |    |
| 3  |   |   |    | 5  |    |    |
|    |   |   | 17 |    |    |    |
| 11 |   |   |    |    | 6  |    |
|    |   | 9 | 10 |    |    |    |
| 12 | 8 |   |    |    |    |    |
| 13 | 7 |   |    |    |    |    |

Ĝuste ordigite, la literoj en la grizaj ĉeloj rezultigas nomon de lando en Oceanio.

### Worte sind der Seele Bild

Worte sind der Seele Bild –  
Nicht ein Bild! sie sind ein Schatten!  
Sagen herbe, deuten mild,  
Was wir haben, was wir hatten. –  
Was wir hatten, wo ist's hin?  
Und was ist's denn, was wir haben? –  
Nun, wir sprechen! Rasch im Fliehn  
Haschen wir des Lebens Gaben.

Johann Wolfgang von Goethe



Unsere Weihnachtsfeier (Bremen, 17.11.2006) / Nia kristnaskofesto (Bremeno, 17-a de Novembro 2006)

## Horizontale

1: elpuŝas aeron el la buŝo; 2: ŝtonego; 3: esti rimarkebla per la nazo [sen finaĵo]; 4: aŭtosigno de Indonezio; 5: eksa germana monunuo [mallongigo]; 6: infinivfinaĵo; 7: flugdrako [sen finaĵo]; 8: granda, globforma frukto; 11: tempo inter vespero kaj mateno; 12: iniciatinto de Esperanto [mallongigo]; 13: substantivfinaĵo.

## Vertikale

1: aloj de kupro kaj stano; 2: malnova mezurunuo de maso; 3: substantivigita numeralo; 9: prefikso, kiu esprimas subitan komencon; 10: artikolo; 14: laŭ Goethe bildo de la animo; 15: estonta varmega [sen finaĵo]; 16: mamulo (latine: *Simia*); 17: aŭtosigno de Kolonjo

### Vortoj estas de l' animo bild'

Vortoj estas de l' animo bild' –  
Ne bildo! Ombro estas tiuj ĉi,  
Bruske diras, klarigas kun mild',  
Kion ni havas, kion havis ni. –  
Kion ni havis, kie estas?  
Kio estas, kion havas ni nur? –  
Nu, ni parolas! Tuj ni kaptas  
La donacojn de l' vivo dum forkur'.

Tradukis Andreas



### Malferma Tago de la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio (Rotterdam, 25-a de Novembro 2006)

Ni (Alke kaj Andreas) unuafoje ĉeestis tian malferman tagon. Post kvinhora trajnveturo ekde la landlimproksima nederlanda urbo Nieuweschans en kelkvoje plenplenaj vagonoj ni duonan horon post tagmezo atingis la Centran Oficejon de UEA. Tie la Ĝenerala Direktoro Osmo Buller bonvenigis nin, kaj ni estis petitaj preni po loto. Tiel Andreas gajnis la libron *Fundamenta Krestomatio*. Ni vizitis la librovendejon kaj aŭskultis du tre amuze prezentatajn prelegojn: Ziko van Dijk prezentis sian doktoran disertacion pri la historio de UEA. Kaj John Wells, antaŭ nelonge emeritiĝinta profesoro pri fonetiko, rakontis pri sia profesia kaj esperantista karieroj. (Li cetere estis videbla en la televid-elsendo *stern* TV de RTL: Ties moderato Günther Jauch estis intervjuita John Wells pri eventualaj dialektoj en la blekado de bovinoj.) Post la kafopaŭzo Alke kune kun kelkaj aliaj vizitis finnan bazaron en la ĉirkaŭaĵo. Dume per la helpo de l' bibliotekisto Rob Moerbeek en la biblioteko de la domo sukcesis Andreas trovi dokumentojn jam de kelka tempo de li serĉatajn kaj de tiuj ĉi ricevis fotokopiojn. Je la 17:15 horo ni veturis reen, kaj ĉiu el ni atingis sian hejmon ankoraŭ en la sama tago. Estis ja streĉa vojaĝado, sed ensume valoris la penon. – Alke, Andreas

### Tag der offenen Tür des Zentralbüros des Esperanto-Weltbundes (Rotterdam, 25.11.2006)

Wir (Alke und Andreas) waren zum ersten Mal bei einem solchen Tag der offenen Tür zugegen. Nach einer fünfstündigen Zugfahrt von der grenznahen niederländischen Stadt Nieuweschans in streckenweise überfüllten Waggons erreichten wir das Zentralbüro des Esperanto-Weltbundes eine halbe Stunde nach Mittag. Dort hieß uns der Generaldirektor Osmo Buller willkommen, und wir wurden gebeten, je ein Los zu ziehen. So gewann Andreas das Buch *Fundamenta Krestomatio* („Grundlegende Chrestomathie“; Chrestomathie: Auswahl von Texten bekannter Autoren). Wir besuchten die Bücherei und hörten uns zwei unterhaltsam dargebotene Vorträge an: Ziko van Dijk präsentierte seine Doktorarbeit über die Geschichte des Esperanto-Weltbundes. Und John Wells, vor kurzem emeritierter Phonetik-Professor, erzählte von seiner beruflichen und Esperantisten-Laufbahn. (Er war übrigens in der Fernsehsendung *stern* TV von RTL zu sehen: Deren Moderator Günther Jauch hatte John Wells über mögliche Mundarten im Muhen von Kühen befragt.) Nach der Kaffeepause besuchte Alke zusammen mit einigen anderen einen finnischen Markt in der Umgebung. Unterdessen gelang es Andreas, seit einiger Zeit von ihm gesuchte Dokumente in der Bibliothek des Hauses mit Hilfe des Bibliothekars Rob Moerbeek zu finden, und bekam davon Fotokopien. Um 17:15 Uhr fuhren wir zurück, und jeder von uns erreichte sein Zuhause noch am selben Tag. Es war zwar ein anstrengendes Reisen, aber unterm Strich hat es sich gelohnt. – Alke, Andreas

### Partopreno en Esperanto-kurso de la Interkultura Centro Herzberg (Esperanto-urbo Herzberg, de la 1-a ĝis 3-a de Decembro 2006)

De la 1-a ĝis 3-a de Decembro 2006 ni, ses membroj de nia klubo, partoprenis en intensa Esperanto-kurso en la Esperanto-urbo Herzberg. Ni alvojaĝis per trajne en la 30-a de Novembro kaj gastigis en la bonkvalita hotelo *Hotel Goldener Hirsch*. En la sekva tago nin bonvenigis la instruistoj Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar. Posttagmeze en bonega vetero ni promenis kun Peter tra la urbo kaj al la akvofalo de Lonau. Poste ni partoprenis en la interkona vespero. La aliaj kursanoj venis de interalie Wuppertal kaj Göttingen. Peter rakontis pri Herzberg kaj lerte ŝanĝis al la instruado. En la sabato serioziĝis. Zsófia instruis nur Esperantlingve tri horojn kaj duonan tre vikle kaj efike. Tiel ĉio tre plaĉis al ni. La dimanĉo pasis simile; ĉiu el ni interalie verkis eseon pri sia urbo. La posttagmezon ni pasigis ludante domemon kun Esperanto-esprimoj. La esprimojn (objektojn, kolorojn kaj nombrojn) ni devis klarigi per tutaj frazoj. Tiel ni multe parolis Esperantlingve. En la vespero ni vojaĝis hejmen. Estis tre bona semajnfino, kaj ni jam antaŭĝojas pri la venonta kurso. – Anke, Günther, Hermann (Nordenham); Dörte, Gisela (Elsfleth); Waltraud (Rodenkirchen)



*Kurs-partoprenantoj kaj  
-organizantoj / Kursteilnehmer  
und -organisatoren*

### Teilnahme an einem Esperantokurs des Interkulturellen Zentrums Herzberg (Esperanto-Stadt Herzberg, 01.-03.12.2006)

Vom 1. bis 3.12.2006 nahmen wir, sechs Mitglieder unseres Vereins, an einem Esperanto-Intensivkurs in der Esperanto-Stadt Herzberg teil. Wir reisten am 30.11. mit dem Zug an und stiegen im gutbürgerlichen Hotel *Hotel Goldener Hirsch* ab. Am Folgetag hießen uns die Lehrer Zsófia Kóródy und Peter Zilvar willkommen. Am Nachmittag spazierten wir mit Peter bei herrlichem Wetter durch die Stadt und zum Lonauer Wasserfall. Danach nahmen wir am Kennenlern-Abend teil. Die anderen Kursteilnehmer kamen aus u. a. Wuppertal und Göttingen. Peter erzählte von Herzberg und ging geschickt zum Unterrichten über. Am Sonnabend wurde es ernst. Zsófia unterrichtete sehr lebhaft und wirkungsvoll dreieinhalb Stunden lang nur in Esperanto. So machte es uns sehr viel Spaß. Der Sonntag verging ähnlich; jeder von uns schrieb u. a. einen Aufsatz über seine Stadt. Den Nachmittag verbrachten wir mit dem Spielen von Domino mit Esperanto-Begriffen. Die Begriffe (Gegenstände, Farben und Zahlen) sollten wir mittels ganzer Sätze erklären. So sprachen wir viel Esperanto. Am Abend fuhren wir heim. Es war ein sehr schönes Wochenende, und wir freuen uns schon auf den nächsten Kurs. – Anke, Günther, Hermann (Nordenham); Dörte, Gisela (Elsfleth); Waltraud (Rodenkirchen)

## La centjariĝo de la Esperanto-grupo de Bremeno (Bremeno, 28-a kaj 29-a de Oktobro 2006)

Por partopreni en la jubileaj aranĝoj de la Esperanto-grupo de Bremeno, tien pertrajne veturis niaj samklubanoj Anne kaj Hermann el Nordenham, Dörte kaj Gisela el Elsfleth kaj Alke el Westerstede. De la stacidomo ili pluveturis trame, kaj pro sia babilado ili maltrafis eltramiĝi en la haltejo ĉe la klubhejmo de la jubileuloj. Tial ili eltramiĝis en la sekva haltejo kaj reveturis unu haltejon per alia tramo. Alveninte en la hejmo, Anne nome de nia klubo transdonis la gratulon kaj anonctabulon kiel donacon. Ĝin montris Hellmut Grebe, prezidanto de la Bremena grupo, dum sia malfermparolo. Estis pano, kuko, kafo kaj teo por la festpartoprenantoj, el ili ankaŭ nederlandanoj kaj slovakino. Poste ili kune veturis trame al la urbcentre situanta junulargastejo, kie estis ekspozicio pri Esperanto kaj la Bremena grupo. Tie ankaŭ niaj pliaj samklubanoj Brigitte el Oldenburg kaj Andreas el Rechtenfleth peraŭte alvenis. Post la tagmanĝo, la festpartoprenantoj promenis laŭlonge de la *Schlachte* (t. e. kafej- kaj drinkejpromenejo apud la Vezero) kaj tra la *Böttcherstraße*, strato konata pro siaj artmetiejoj. Pri ĉio ĉi Dieter Hartig donis al ni multajn interesajn informojn. Post la reveno al la junulargastejo sekvis la festprelego de Hellmut Grebe, kafopaŭzo, vespermanĝo



Ĉe la Roland de  
Bremeno / Am Bremer  
Roland

kaj koncerto de la muzikgrupo *Kajto*. Tiu ĉi prezentis belegajn Esperant- kaj frislingvajn kantojn. La aŭskultantoj ĝuis la klarajn voĉojn akompanatajn de flutoj, gitaroj kaj aliaj senescepte ne-elektronikaj muzikinstrumentoj kaj kunkantis dum kelkaj muzikaĵoj. Antaŭ la vespermanĝo oni asignis ĉambrojn al tiuj festpartoprenantoj, kiuj volis tranokti en la junulargastejo. Ĉambro, kiu ordinaro estas asignata al handikapuloj kaj eble tial super la lito disponas je ruĝa ŝnureto kiel alarmŝaltilo, estis asignita al Anne kaj Alke. Ili erare kiel la lit-lumŝaltilon rigardis tiun ruĝan ŝnureton, tiris ĝin kaj per tio subite funkciigis alarmon. Feliĉe ili tuj trovis kaj funkciigis la alarm-malŝaltilon apud la ĉambro-lumŝaltilo apud la pordo. Sed la servistino jam estis sciigita kaj demandis, ĉu ĉio estas en ordo, kion niaj du amikinoj kompreneble jesigis. Post nokta vizito de la popolfesto *Bremer Freimarkt* ("libera foiro de Bremeno") kune kun la *Kajto*-anoj kaj kelkaj aliaj partoprenantoj de la jubileaj aranĝoj estis en la sekva tago gvidado tra la urbo kaj *Überseemuseum* ("transmaraj-muzeo"; inkluzive de kuna tagmanĝo). Ĉirkaŭ la 14:00 horo la festpartoprenantoj adiaŭis sin – iuj nur por mallonga tempo, ĉar ili revidis sin por dua adiaŭo en la junulargastejo, el kiu ili prenis siajn valizojn. Alke, Anne kaj Hermann trinkis kafon en la stacidomo kaj veturis hejmen pertrajne. Ili estis iom lacaj kaj ankaŭ iom malgajaj, ĉar la belega festo de niaj Bremenaj geamikoj ja nun estis finiĝinta. – Anne

## Das hundertjährige Bestehen der Esperanto-Gruppe Bremen (Bremen, 28. und 29.10.2006)

Um an den Jubiläumsveranstaltungen der Esperanto-Gruppe Bremen teilzunehmen, fuhren unsere Vereinsmitglieder Anne und Hermann aus Nordenham, Dörte und Gisela aus Elsfleth und Alke aus Westerstede mit dem Zug dorthin. Vom Bahnhof fuhren sie mit der Straßenbahn weiter und wegen ihres Schwatzens verpassten sie es, an der Haltestelle am Vereinsheim der Jubilare auszusteigen. Daher stiegen sie an der nächsten Haltestelle aus und fuhren eine Haltestelle mit einer anderen Straßenbahn zurück. Im Heim angekommen, überbrachte Anne im Namen unseres Vereins die Gratulation und eine Anzeigetafel als Geschenk. Hellmut Grebe, Präsident der Bremer Gruppe, zeigte es in seiner Eröffnungsrede. Es gab Brot, Kuchen, Kaffee und Tee für die Festteilnehmer, unter ihnen Niederländer und eine Slowakin. Dann fuhren sie gemeinsam mit der Straßenbahn zu der in der Innenstadt liegenden Jugendherberge, wo es eine Ausstellung über Esperanto und die Bremer Gruppe gab. Dort kamen auch unsere weiteren Vereinsmitglieder Brigitte aus Oldenburg und Andreas aus Rechtenfleth mit dem Auto an. Nach dem Mittagessen spazierten die Festteilnehmer entlang der *Schlachte* (d. i. eine Café- und Kneipenpromenade an der Weser) und durch die *Böttcherstraße*, eine wegen ihrer Kunsthandwerkstätten bekannte Straße. Über all das gab uns Dieter Hartig viele interessante Informationen. Nach der Rückkehr zur Jugendherberge folgten der Festvortrag Hellmut Grebes, die Kaffeepause, das Abendessen und das Konzert der Musikgruppe *Kajto*. Diese präsentierte wunderschöne Esperanto- und friesischsprachige Lieder. Die Zuhörer genossen die klaren Stimmen, die von Flöten, Gitarren und anderen ausnahmslos nicht-elektronischen Musikinstrumenten begleitet wurden, und sangen bei einigen Musikstücken mit. Vor dem Abendessen wies man denjenigen Festteilnehmern Zimmer zu, die in der Jugendherberge übernachten wollten. Ein Zimmer, das normalerweise Behinderten zugewiesen wird und vielleicht deshalb über eine sich über dem Bett befindende rote Schnur als Alarmschalter verfügt, wurde Anne und Alke zugewiesen. Irrtümlich hielten sie jene rote Schnur für den Bettlichtschalter, zogen daran und lösten dadurch plötzlich einen Alarm aus. Glücklicherweise fanden und betätigten sie sogleich den Alarm-Ausschalter neben dem Zimmerlichtschalter neben der Tür. Aber das Hausmädchen war schon benachrichtigt worden und fragte, ob alles in Ordnung sei, was unsere zwei Freundinnen natürlich bejahten. Nach einem nächtlichen Besuch des Volksfestes *Bremer Freimarkt* zusammen mit den *Kajto*-Mitgliedern und einigen anderen Teilnehmern der Jubiläumsveranstaltungen gab es am Folgetag eine Führung durch die Stadt und das Überseemuseum (einschließlich eines gemeinsamen Mittagessens). Gegen 14:00 Uhr verabschiedeten sich die Festteilnehmer – manche nur für kurze Zeit, denn sie sahen sich für einen zweiten Abschied in der Jugendherberge wieder, aus der sie ihre Koffer holten. Alke, Anne und Hermann tranken einen Kaffee am Bahnhof und fuhren mit dem Zug heim. Sie waren etwas müde und auch etwas traurig, weil die wunderschöne Feier unserer Bremer Freunde ja nun zu Ende gegangen war. – Anne